

Nia kvaronjarcenta esperantisteco, 4-a parto
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 740, 1977.12.14 & 16 & 17

Cl.- Parolas Claude Gacond.

Antaŭ ekzakte 25 jaroj mi komencis praktiki esperanton. Por iel marki tiun ĉi personan eventon, mi prezentas dum kelkaj prelegoj rememorojn aŭtobiografiajn.

La hungara ribelo de la jaro 1956 havis neatenditan rezulton en la vilaĝo La Sagne, kie mi estis instruisto. Okaze de la jarkunveno de Svisa Esperanto-Societo mi renkontis en Zürich la hungaran fuĝinton Istvan Morocz. Lin mi invitis por kelksemajna restado en mia fraŭla hejmo. Ĉar li interese raportis pri la hungaraj okazintaĵoj kaj pri sia fuĝo al Aŭstrio kaj pri la servoj, kiujn esperanto alportis al li por kontakti aŭstrojn en Vieno kaj svisojn en Tiĉino, mi organizis fondu-vesperon. Mi invitis kolegojn kaj vilaĝanojn. Ĉiu devis alporti porcion da fromaĝo kaj da pano. Ho, tiu ĉi fonduo restis memorinda. La gastoj alvenis vice, kaj iliaj fromaĝ-porcioj aldoniĝis al la manĝata fonduo, alportante al ĝi novan neatenditan karakteron. Estas en tre gaja etoso, ke Istvan Morocz rakontis siajn aventurojn. Mi interpretis lin france frazon post frazo. La demandoj de la invititoj ne nur celis la hungarajn eventojn, sed ankaŭ esperanton, kaj la vilaĝanoj instigis min instrui esperanton en la lernejo. Mi respondis, ke pri tio nur povas decidi la lerneja komisiono kaj inspektoro.

Kelkajn tagojn poste mi estis invitita prezenti esperanton al la membroj de la lerneja komisiono, kiuj entuziasme donis al mi la permeson nedevige instrui esperanton. La lernejspektoro tre interesiĝis pri tiu ĉi eksperimento, kaj la instruado de esperanto kaj la interlerneja korespondado fariĝis la temoj de mia instruista finstuda tezlaboro. Tio ĉi devigis min celkonscie planadi tiun eksperimenton. Mi pretigis instruprogramon, kiu fariĝis poste komuna fundamento por pli vasta eksperimento, al kiu partoprenis tri aliaj kolegoj : Michel Frésard, kiu poste migris al Kolombio, Simone Chapatte kaj poste Charles Ecabert, kies akcidenta morto abrupte ĉesigis tiun ĉi kampanjon.

Ni tre bedaŭris, ke tiu ĉi kampanjo nur disvolviĝis en franclingva Svislando. Ni tamen organizis gravajn interlernejajn kunvenojn, kiuj altiris ne nur la gelernantojn kaj ties gepatrojn, sed ankaŭ reprezentantojn de la lerneja aŭtoritatoj kaj multajn interesitajn kolegojn.

Iom post iom kreiĝis la asocio Esperanto-Edukistaro de Svislando, kies sektretario mi fariĝis kaj kiun prezidis Charles Ecabert. Mi ne povas silenti pri la neordinara kontribuo de tiu ĉi latinisto al nia kampanjo. Li entuziasmiĝis por esperanto okaze de grava manifestacio, kiun ni organizis en 1959 en Neuchâtel en la porinstruista lernejo por festi la zamenhofan jubileon. Prelegis Edmond Privat kaj Pierre Bovet, prezentis recitaĵojn kaj kantojn la gelernantoj de tri klasoj kaj folklorajn dancojn japana ĵurnalistino. Charles Ecabert admiris, kiel la gelernantoj senpere konversaciis kun la japanino. Li akompanis ilin dum muzea vizito, havante la impreson ĉeesti miraklon.

Kun granda dinamismo li tuj tre aktive transprenis la gvidadon de la kampanjo Esperanto en la Lernejojn farante kun la klaso licea, kiun li havis, tre interesan eksperimenton, kie la instruado de esperanto servis tiun de la redaktado franclingva kaj tiun de la studado de la latina lingvo. Li raportis pri tiu ĉi eksperimento okaze de grava manifestacio, kiu disvolviĝis en Neuchâtel en la duagrada lernejo. La postan jaron, tio estas en 1961, li prezidis en mia vilaĝo La Sagne kulturen semajnfinojn, kiu grupigis pli ol 200 personojn : la esperanto-

gelernantojn de Neuchâtel, La Sagne kaj Les Bois, iliajn gepatrojn, multajn instruistojn kaj esperantistojn el tuta Svislando.

La asocio Esperanto-Edukistaro de Svislando antaŭvidis la organizadon de feriaj kursoj, en la celo iom post iom starigi ferian altlernejon esperantistan. Charles Ecabert pretigis kurson pri klasika kaj esperanta humanismoj. Edmond Privat, kiu estis fondinta en 1925 la Internacian Someran Universitaton, alportis siajn apogon kaj konsilojn kaj la vilaĝo La Sagne estis preta meti senpage je la dispono de tiu ĉi feria universitato sian lernejon kaj sian prelegejon. Bedaŭrinde la tuta programo subite disfalis pro la morto de Edmond Privat kaj de Charles Ecabert. Tiu lasta estis ĵus transpreninta la redaktoran postenon de Edmond Privat por la esperanto-programo ĉe la kurtunda servo de nia svisa radio. Nur tri elsendojn li povis registri. La 15-an de decembro 1962, pro akcidenta kaŭzo, li neatendite pereis okaze de flegado en la neŭŝatela hospitalo. Drama zamenhofa tago, kiu senigis nin de la plej kompetenta kunlaboranto ekzakte antaŭ 15 jaroj.

Kiel sekretario de la asocio Esperanto-Edukistaro de Svislando mi troviĝis antaŭ tasko, kiu superis miajn laborfortojn kaj kompetentecon. En tiu ĉi malfacila kaj peniga etoso komenciĝis la sekvantan semajnon mia poresperanta laboro ĉe la radio. Ni provis ne haltigi la laboron de la kampanjo Esperanto en la Lernejojn, daŭrigante la organizadon de gravaj demonstraĵoj renkontiĝoj.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !